



Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

decembro (1) - '92

IOM PRI LA LITERO Ĥ

Mi estas *arkeologo* kaj mi okupiĝas pri *arkeologio*. Mi ĉiam skribas tiujn vortojn per "k", kaj neniam per "ĥ". La tendenco en esperanto ekde la fruaj jaroj de publika uzo de la lingvo, favoranta substituon de "k" al "ĥ", apogas mian elekton. Sufiĉas citi la opinion de Zamenhof:

...*"En ĉiuj nove enkondukotaj vortoj oni devas eviti la sonon ĥ kaj uzi anstataŭ ĝi la sonon k". La ĝisnun jam ekzistantajn vortojn kun "ĥ" estas permesate uzi ankaŭ kun "k"*... (Leteroj de Zamenhof, SAT, 1948, vol.2 p. 121.)

"K" estas universala sono, egale facila por ĉiuj popoloj en la mondo, dum "ĥ" prezentas malfacilaĵon eĉ por kelkaj popoloj en Eŭropo, ekzemple parolantoj de la angla kaj franca lingvoj, en kiuj la sono ne ekzistas. Estas neracie insisti pri la konservo de "ĥ en grafisma kaj fonetisma lingvo, kies propagandistoj fanfaronas, ke ĝi estas lingvo por la tuta mondo.

"Ĥ" prezentanta la literon χ (ĥi) en la helena alfabeto, estas anstataŭigita en esperanto plej ofte per "k", kelkfoje per "ĉ". Fakte, χ kondukas tute nekonsekvence en esperanto, aperante jen kiel "ĥ" en "ĥimero" kaj "ĥameleono", jen kiel "k" en "kiasmo" kaj "kiromanĉio". Kelkfoje la formo kun "ĥ" estas signita kiel arkaika en vortaroj: la zamenhofa "ĥitono" kaj "ĥirurgo" estas hodiaŭ "kitono" kaj "kirurgo". En PIV (Plena Ilustrita Vortaro) "ĥilo" estas "ĉilo"; En la franca vortaro de Waringhien "ĉalazio" anstataŭas "ĥalazio", dum en PIV ĉi estas "kalazio".

Tiu ĉi procedo senhalte disvastiĝas kaj tuŝas preskaŭ ĉiujn helendevajn vortojn kun "ĥ". tiel, pli kaj pli ofte videblas *kemio*, *mekaniko* kaj *kaoso* anstataŭ *ĥemio*, *meĥaniko*, *ĥaoso*. Oni

preskaŭ neniam aŭdas tiujn vortojn parolataj kun la "ĥ"-sono. Cetere la tendenco etendiĝas trans la helendevan parton de la esperanta leksiko kaj efikas sur ĝermendevajn vortojn kiel la arkaikaj "ĥino" kaj "ĥaĥto", kiuj nuntempe estas "ĉino" kaj "ĵakto".

Tiuj ŝanĝoj ja havas la sankcion de la Akademio de Esperanto, kiu toleras la modernajn formojn. (Aktoj de la Akademio, No. 10, II. 1968-1974. p. 79.) Ankaŭ la esperanta publiko subtenas la eliminion de "ĥ". Ekzemple, la ĉinoj mem uzas la formon de sia gentnomo kun komenca "ĉ", ne kun "ĥ", kiun oni ankoraŭ povas vidi sur la paĝoj de *Scienca Revuo*.

Efektive, la troa uzado de "ĥ" en tekstoj publikigitaj en la menciita revuo donas la impreson de fosiliĝinta ortografio.

Ĉi-kuntekste valoras citi la opinion de pli klarvida scienculo, kiu trafte sumas la nunan staton kaj la estontecon de "ĥ" en esperanto. Paul Neergaard skribas jene:

"La fonemo ĥ estas praktike survoje eliĝanta el esperanto, ĉu tion oni ŝatas aŭ ne. Estas vere, ke unuopuloj ĝin kvazaŭ kultivas, sed tio ne povas neniigi la fakton, ke ĝi malofte ĝas kaj verŝajne fine praktike malaperas en la komuna lingvo. Pri la fakta lingvo de nomenklaturado la situacio ja estas iom alia, sed estas konsilinde, mi opinias esti iom modera, por ke la teknika lingvo ne tro kontrastu al la komuna lingvo de esperanto, kaj al ĝiaj neslavaj fontolingvoj, en kiuj oni sekvas aliajn regulojn por transliterado kaj prononcado". (P. Neegaard:

Plantnomoj en la lingvo internacia. La Laguna, 1987. p. 485-501).

Estas interese observi ankaŭ, kiel la fundamenta vorto "ĥoro" iom post iom perdis terenon al sia tre malnova rivalo "koruso", proponita de Zamenhof jam en 1906! Krom "koruso" li rekomendis ankaŭ "ĉoro", sed ĝi restis mortnaskita vorto. La evoluo de "ĥoro" al "koro" ne povis okazi pro homonima konflikto kun la jam ekzistanta "koro". Aliaj vortoj, kiuj ankoraŭ estas literitaj per "ĥ" estas "ĥoralo" kaj "ĥolero" por eviti homonimecon kaj por diferencigi ilin disde "koralo" kaj "kolero" respektive. "Ĉolero", proponita de Zamenhof, kaj ankaŭ "kolerao", ankaŭ ne sukcesis anstataŭi "ĥolero"-n. Krome, restas kun "ĥ" en esperanto relative malofte uzataj hebreaj vortoj kaj propraj nomoj el la Biblio, ankaŭ helenismoj kaj mitologiaj nomoj, kaj malgranda mikspoto da slavaj, hispanaj kaj aziaj vortoj kaj propraj nomoj. Ankaŭ ĉe tiuj ĉi manifestiĝas la tendenco uzi "k" anstataŭ "ĥ". Ĉe la artikol-vorto "ĥaribdo" en PIV estas la jena rimarko: "Same pri la aliaj helenaj nomoj komenciĝantaj per Ĥ, serĉu sub K."

Tiu ĉi progresema tendenco en la vivanta esperanto estas spegulita nuntempe en PIV, ĉefredaktita de G. Waringhien, en pluraj etnolingvaj esperantaj vortaroj kaj en preskaŭ ĉiuj prestiĝaj periodaĵoj kun internacia karaktero.

Eĉ plirimarkinda estas ĝia frueco. Eugen Wüster en sia monumenta *Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana* jam antaŭ preskaŭ sep jardekoj registris "arkeologo" kaj listigis plurajn aliajn "k"-

vortojn kiel *kameleono*, *kimero* kaj *kaoso*, kiuj en PIV ankoraŭ estas literitaj per "ĥ". Kaj antaŭ okdek jaroj la sama prefero al "k" troviĝas en la Plena Vortaro de Boirac kaj la Enciklopedia Vortareto de Verax.

Bernard Golden
el Le Travailleur Esperantiste, oktobro/1992.

Ĥ?

K!

La Universalaj Kongresoj laŭlande

La internacilingva movado en la 19-a jarcento havis tri kongresojn (volapukistajn), kaj en la 20-a jarcento 77 Universalajn Kongresojn de Esperanto. Kune kun la planitaj tri kongresoj en 1993, 1994 kaj 1995 entute ni kalkulas okdek tri kongresojn.

La laŭlandan dividon de tiuj okdek tri kongresoj vi vidas en la suba, iom nekutima tabelo. Ĝi montras, ke en kiuj landoj okazis la plej multaj kongresoj: Germanio (9), Britio (8), Svisio (6), Pollando (6), Francio (6) kaj Nederio (5). En tiuj ses landoj okazis 40, t.e. preskaŭ duono de la kongresaro. En pliaj sep landoj okazis pliaj dudektri kongresoj: Aŭstrio (4), Belgio (4), Svedio (4), Hungario (3), Danio (3), Usono (3) kaj Suomio (3). Do, *en dektri da landoj koncentriĝis tri kvaronojn de la kongresaro!*

Per **dika** teksto ni signis la lastajn kvardek kongresojn. Per *kursivo* ni signas la lastajn dudek kongresojn. La laŭlanda dividiĝo de la kongresaro en la lastaj kvardek jaroj estis pli varia, ol en la jardekoj de la unuaj kvardek kongresoj. La geografian disvastiĝon demonstros la fakto, ke el la naŭ ekstereŭropaj kongresoj kvin estas en la lastaj dudek. Alimaniere: el la lastaj dudek kongresoj kvarono estas ekstereŭropaj.

1921	Ĉeĥio
1953	Kroatio
1965	Japanio
1973	Serbio
1976	Grekio

1977	Islando
1981	Brazilo
1984	Kanado
1986	Ĉinio
1990	Kubo
1994	Koreo
1963, 1978	Bulgario
1935, 1955	Italio
1952, 1991	Norvegio
1910, 1915, 1972	Usono
1956, 1962, 1975	Danio
1929, 1966, 1983	Hungario
1934, 1948, 1980	Svedio
1909, 1968, 1993	Hispanio
1922, 1969, 1995	Suomio
1911, 1928, 1960, 1982	Belgio
1924, 1936, 1970, 1992	Aŭstrio
1920, 1954, 1964, 1967, 1988	Nederio
1889, 1905, 1914, 1932,	
1950, 1957	Francio
1912 ^{**} , 1927 ^{***} , 1931,	
1937, 1959, 1987	Polio
1906, 1913, 1925,	
1939, 1947, 1979	Svisio
1907, 1926, 1930, 1938, 1949,	
1961, 1971, 1989	Britio
1884, 1887, 1908, 1923, 1933,	
1951, 1958, 1974, 1985	Germanio

* Pro la eksplodo de la unua mondmilito la plimulto de la kongresanoj ne atingis la kongresurbon Parizo, kie okazis nur unu kunveno de la kongreso.

** En Krakovo, tiam apartenanta al Aŭstrio.

*** En Danzigo (1919-1939 sendependa ŝtato), ekde 1945 Gdansk.

Árpád Rátkai, Hungario

Opinioj

Komento al: "Ĉu UEA ne kapabla?"

Ĉiam necesas pripensoj pri ŝanĝo de ekzistanta stato, ankaŭ pri "plibonigo" de UEA, kion ajn signifitu tio.

Unue temas pri financa bazo. Ĝenerale la financado estas problemo de la manaĝado, kaj tuj ekestas la demando: *Ĉu la Interna Ideo estas sur ekonomia merkato manegebla?*

Ĉiu merkato postulas bezonojn, aŭ pli precize: faritaj varoj serĉas merkaton - ankaŭ laŭ la vidpunktoj de kvazaŭ "postmoderna" ekonomio aŭ de nova ek-kapitalismo. La propono, fondi helpe de membroklotizoj firmaon, kiu dum ekonomia krizo povas bankroti, estas do tre duba propono!

Hodiaŭ ne plu temas pri "merkato de bananoj", simbola por evoluantaj landoj. Ne temas pri vendado de "bananoj" en eksocialismaj landoj, sed pri la pagado de la antaŭe liverita propagando, - kaj konsekvence, pri la hodiaŭa ekonomia kaj ekologia krizo de la kapitalisma sistemo, kiu povas travivi la recesion nur per malfermo de novaj pageblaj merkatoj. Kaj tutsimple tio estas ankaŭ nia problemo, ĉar evidente, se dum la lastaj 105 jaroj la *esperanto-varo* ne estis vendebla, kiel ĝi povus esti tia hodiaŭ?

La proponita ĉefa celo estis: "...utiligi la kapitalon profite...". Plej granda profiteblo por iu kapitalo estas antaŭ ĉio la internacia merkato pri drogaĉoj, la "kapitalpurigado" (taksita sumo ĉ. 400 miliardoj, - ankaŭ en kotiznepagipovaj landoj), kaj la eksporto de armiloj (ĉ. 24 miliardoj nur el Usono, pliaj sumoj el aliaj pacamantaj landoj kiel Ĉinio, Brazilo, Israelo, ktp). El tiu vidpunkto mi preferas laman UEA, kiu pripensas, kie ĝi investas! UEA baziĝas bone sur la federacia sistemo de kontrolemaj Landaj Asocioj. Ŝajnas do, ke eĉ la membroj ne volas tiurilate signifan rolon de UEA en la ekonomia mondo.

Aliflanke ni ĉiuj konas religiojn kaj sektojn, bonege manaĝitaj por puraj profitorientitaj celoj...

Ekonomio estas dura ludo de oferto kaj demando, kaj sub mondvesta aspekto de ekologio ĝi verŝajne estas la t.n. "nulsumoludo", en kiu laŭ la Pareto-optimumo eblas gajni nur surkoste de perdantoj.

Eĉ se ne multe ŝanĝiĝas la esperantomovado kaj UEA, ĝis nun ĝi minimume ne perdiĝis, spite al esperantismaj individualistoj.

Rudi Hauger, Svisio,
Ĝen. sekr. de ISAE

Regularo pri la Belartaj Konkursoj de UEA

Artikolo 1.

1. La Belartaj Konkursoj havas la econ evoluigi la artojn en kaj pere de la Internacia Lingvo. Ili okazas ekde 1950 sub aŭspicio de UEA dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto.
2. La Belartaj Konkursoj enhavas jenajn branĉojn:
 - a) Poezio originala (maksimuma longo de poemo ne fiksita)
 - b) Prozo originala (maksimuma longo de verko 200 x 65 maŝinskribitaj spacoj)
 - c) Eseo originala pri temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia, prefere en ligo kun la Internacia Lingvo aŭ ĝia uzado - Premio Luigi Minnaja (proksimuma longo 10 tajpitaj paĝoj; ĉirkaŭ 400 x 65 maŝinskribitaj spacoj)
 - ĉ) Teatraĵo originala
 - d) Fotografio (la fotografiaĵoj povas esti nigra-blankaj aŭ koloraj, kaj de minimuma formato 13 x 18 cm kaj ili estu teme ligitaj al la lingvo esperanto aŭ al la kongresa temo)

- e) Kanto (la teksto kaj melodio povas esti verkitaj de malsamaj aŭtoroj - premio An-okin Korea pri Kanto)
- f) Infanlibro de la jaro (eldonejoj rajtas proponi librojn originalajn aŭ tradukitajn, kiuj aperis en la antaŭa jaro, por kiuj ne validas la reguloj sub Art.2. 2 kaj 3).
3. Laŭ rekomendo de la prezidanto kaj sekretario de la Komisiono, la Estraro povas ŝanĝi la kondiĉojn menciitajn en paragrafo 2) rilate al iu(j) branĉo(j).
4. La Estraro de UEA povas decidi, ke iu konkurso enhavu ankaŭ aliajn branĉojn, ekzemple muzikon, dancon, arton grafikan kaj plastikan ktp., laŭ la principoj de tiu ĉi regularo. La Estraro povas aliflanke decidi ne okazigi iun branĉon en iu jaro.
5. Laŭ la bontrovo de sia Estraro kaj post interkonsultiĝo kun la prezidanto kaj sekretario de la Belartaj Konkursoj UEA povas ankaŭ doni sian aŭspicion al tradukkonkursoj organizotaj de landaj asocioj aŭ aliaj fidindaj institucioj.

daŭrigota

Faka aplikado

KLERIGA KIBERNETIKO

En januaro 1993 aperos la unua publikaĵo de la internacia eldonejo "Akademia Libroservo", la 1140-paĝa tolaĵbindita libro

Kybernetische Pädagogik /Klerigkibernetiko,

kollektanta 105 originalajn sciencajn artikolojn pri klerigkibernetikaj, interlingvistikaj, lingvopolitikaj, komputil-edukaj, informacipsikologiaj kaj similaj temoj. Ili estas grandparte germanlingvaj; la dua plej uzata lingvo estas esperanto (ILO); kelkaj estas en la angla, franca, itala kaj ĉeĥa. Ĝis nun ili estis publikigitaj en la plej diversaj revuoj kaj prelegkolektoj en la jaroj 1973-1992. La aŭtoroj, prof.dr. Helmar Frank kaj liaj kunlaborantoj el la Kibernetika Instituto Berlin-Paderborn,

tiamaniere kunmetis la plej interesajn erojn, kiuj ebligis orientiĝi kaj informi en la koncernaj kampoj kaj sekvi ilian evoluon, i.a. enkadre de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS).

La libro enhavas registron de klerigkibernetikaj fakterminoj en la germana kaj en esperanto, kaj esperantlingvan difinaron de la plej gravaj terminoj. Tiel ĝi povas utili ankaŭ kiel vortaro-enciklopedio.

Pro subvencio ni povas oferti duonprezon 30 GM al mendintoj ĝis la fino de januaro, poste la normala prezo, 60 GM estos kutime rabatita ĉe mendo de min. 5 ekzempleroj. Po 15 GM vi povas ricevi ankaŭ la antaŭajn 5 volumojn de la artikolkolektoj de nia instituto el la jaroj 1959-1972.

Institut für Kybernetik,
Kleinenberger Weg 16b,
D-W-4790 Paderborn, Germanio;
tel. +49-5251-64200.

Pagoj al: Volksbank Paderborn,
BLZ-47260121, konto 8821960400.

Bydgoszcz, 26a de septembro - 2a de oktobro

INTERNACIA FOIRO DE ESPERANTO-TURISMO

Tiu ĉi foiro okazis jam la 18an fojon, kaj por kelkaj vizito al Bydgoszcz je la internacia tago de turismo (27. sept.) estas jam kutimaĵo. Ĉi-foje al la sidejo de *Monda Turismo/Esperantotur* venis direktoroj kaj reprezentantoj de dudeko de turismaj oficejoj el 11 landoj.



La programo estis labora. Raportoj pri la agado en 1992. Ofertoj por 1993. Publikaj estarkunsidoj

de Monda Turismo. Duflankaj interparoloj. Prilaboro de la *Turisma Esperanto-Kalendaro* por 1993. La partoprenintoj aktive subskribis kontraktojn, kaj interŝanĝis siajn planojn.


Konstateblas, ke malgraŭ la plorinda ekonomia situacio en Orienta Eŭropo, ĝuste orienteŭropanoj avangardas sur la kampo de esperanto-turismo. Malgraŭ enorma konkurenco, la e-istaj vojaĝ-oficejoj - dank' al la tradicia solidareco kaj reciproka fido, tiom raraj inter la postkomunistaj firmaoj - sukcese postvivis.

Tamen ne ĉio estas en ordo. Eĉ *Esperantotur* frontis problemojn, post kiam ĝiaj filioj/agentoj en pluraj urboj de Polio sekvante la modon proklamis sin sendependaj. Rezulte aperis dudek kelk oficejoj, el kiuj preskaŭ neniuj kapablas vivteni sin per esperantoturismo... Aldoniĝis problemoj bankaj, ks. Tamen Esperantotur plu restas la plej granda e-ta vojaĝoficejo kun propra hotelo, kafejo-klubejo, avia biletejo, manĝaĵvendejo, satelita televido k.a.

Kelkaj miloj da polaj turistoj uzas jare servojn de Esperantotur, kiu ĉi-jare ricevis belan subvencio de la Urbeŝtaro de Bydgoszcz

por organizo de kultursemajnoj en la urba Internacia Kultura Centro. Kaj la direktoro de Esperantotur *Andrzej Grzebowski* havas plurajn novajn ideojn, interalie pri faciligo de transpago, funkciigo de regula bus-linio kun haltoj en kelkaj orienteŭropaj landoj, individuata turismo, k.a.

Ekster la labora programo okazis bus-ekskursoj al Poznan kaj Torun, pieda promenado tra Bydgoszcz, slajda, videofilma kaj adiaŭa vesperoj. Al la lasta venis grupo de studentoj el la internacia studumo pri turismo, kiuj post naŭmonata studado memstare laboros en la sfero de la internacia turismo.



Ne mankis ekstera intereso. Por la foiraĵoj estis prezentita koncerta programo en la vojevodina kulturdomo kun postkoncerta kafo. En Torun okazis akcepto en la urba etnografia muzeo, vizitado de skanzeno kaj amika renkonto kun lokaj esperantistoj. Dufoje venis TV-stabo, kaj ambaŭfoje Halina Gorecka (Jekaterinburg) devis kontentigi la scivolon de la raportistoj.

La kunlaboro daŭras. Somere *Monda Turismo* havos sian simpozion en Budapeŝt kaj ĝeneralan konferencon en Poprad. Kaj februare Bydgoszcz akceptos dezirantojn studi la metion de e-ista vojaĝgvidanto.

Aleksander Korŝenkov
laŭ Ruslanda Esperantisto, 10/92.

Enhavo de la 43-a volumo de Sciencia Revuo

- Kulturo kaj socio de norda baktrio (V. I. Ionesov - SU)
- Interago de vitamino A kaj imunostimuloj (I. Ŝigaev - SU)
- Pri la emocia ploro (P. Szabó, - H)
- Analizoj de averioj kaj konstru-katastrofoj (A. Kaniak - PL)
- Kelkaj aspektoj de la kemio de naturaj substancoj (M. Hesse et al. - CH)
- Bulgario - malfacilaĵoj ĉe transpaso ĉe Rubikono (S. Panajotova - BG)
- Intervjuo pri hospitalo de referenco (J. L. Besada - C)
- Pri la deklaro de Kari-Oca (Incomindios - CH)
- Muroj de miljaroj - ĉu ekzistas senmuraj socioj? (R. Hauger - CH)

Sciencia Revuo

Fondita 1904 kiel Internacia Sciencia Revuo

Vol. 43 (1992)(1) - 160
ISSN 0048-9557

Internacia Sciencia Asocio Esperantista

Malnovaj numeroj de Sciencia Revuo

Laŭ interkonsento de ISAE kaj Edistudio (Italio), la ĝisnunaj, malnovaj volumoj de Sciencia Revuo estas prizorgataj kaj vendataj pere de Edistudio, kiu ĝis nun presis ilin. Do, la malnovajn numerojn ne petu ĉe la ISAE-sekretario, sed turnu Vin rekte al:

Edistudio, B. Cassini,
CP 213, I-56100 Pisa, Italio.

Kotizo per artikolo

La baza kotizo por ISAE-membreco (inkluzivanta la ricevon de Sciencia Revuo) estas 25 svizaj frankoj, 18 USD, aŭ 35 guldenoj. La kotizoj devas esti pagitaj ĝis la 31a de marto al la kasisto-sekretario de ISAE, aŭ al la UEA-kodo: isae-z. La kotizo estas "pagebla" ankaŭ per verko de artikolo por la Sciencia Revuo! (Kondiĉoj: aa./ la red. komisiono akceptu la artikolon por publikigo; bb./ la artikolo estu lingve senerara, kaj enhave prespreta!)

Ne timu la vorton "sciencia"! Membro de ISAE povas iĝi ne nur "sciencistoj", sed ankaŭ ĉiuj inĝenieroj aŭ teknikistoj, ktp.!

Pliajn informojn petu de la sekretario-kasisto de ISAE:

Rudi Hauger, Ringstrasse 13,
CH-8172 Niederglatt, Svisio.

Aranĝoj


Kie renkonti la novan jaron?

Estas ĉiam agrabla zorgo solvi la demando: *kie ni pasigu la Silvestro-feston, kie ni renkontu la novan jaron?*

Kaj por ni esperantistoj estas aldona demando: Kial ne en esperantista medio? Feliĉe, ekzistas pluraj aranĝoj tiutempe. Jen kelkaj el ili.

- **NOJUR**, Novjara Junulara Renkontiĝo, 28.12. - 03.01., loko: Swieradow Zdroj. Org.: Elzbieta Kulik, ul. Orzechowa 107 m. 2, PL-50-540 Wroclaw, Polio, aŭ Grazyna Mirkiewicz +48-71-688232.
- **IS**, Internacia Seminario de GEJ, 28.12. - 03.01., loko: Bad Kleinen. Org.: Germana Esperanto-Junularo, Rheinweg 15, DW-5300 Bonn-1, Telefono: +49-228-235898, Telefakso: -232764
- Silvestra festo en Praha, 5 tagoj. Org: Interhelpo, pk. 44, CS-150 00 Praha 5, Ĉeĥoslovakio, Telefono & telefakso: +42-2-542993.
- **Eŭr-Azio '92**, 29.12. - 05.01. Loko: Jekaterinburg, Org: Ruslanda E-Asocio, pk. 67, RUS-620077 Jekaterinburg-77, Rusio. Telefaks: +7-3432-514707 ATT MARAT.
- **IF**, Internacia Festivalo por mezaĝuloj, 27.12. - 03.01. Loko: Kloster Hoechst (apud Frankfurt), Org: H.D. Platz, Pf. 1148, DW-3501 Niedenstein, Germanio. Telefono: +49-5624-8007, Telefakso: +49-5624-322.
- Silvestra Festo en Peterburg, 30.12. - 02.01. Org: E-Societo Espero, pk. 130. RUS-197022, St. Peterburg, Rusio.

Se vi ankoraŭ ne faris, rapide skribu, sed prefere telefone aŭ telefakse aliĝu!



Internacia Junulara Festivalo

- paske en Italio -

La sekvajara IJF okazos inter la 7a kaj 13a de aprilo 1993 en la vilaĝo Bomba di Villa Santa Maria (Chieti, sudcentra Italio) kun la ĉeftemo: "Turismo". Averaĝa kotizo: ĉ. 180.000 liroj.

Jam nun rezervu tiujn tagojn libera, ke vi povu partopreni en IJF! Pliaj detaloj en postaj numeroj.

informo el ITINFO, okt/92.

SAT-Amikara Kongreso



La 48-a kongreso de SAT-Amikaro okazos en *Hérouville-Saint-Clair* (apud la urbo Caen, Francio) inter la 9-a kaj 13-a de aprilo 1993. Pliaj informoj ĉe:

SAT-Amikaro,
67 ave. Gambetta,
F-75020 Paris,
Francio

Raporto pri ILEI-seminario:

Situaci-komunika instruado

Ok roluloj gaje ludis, aktorin, lernis, studis, intervjuis, raportis, aventuris... senlace de matenaj ĝis noktaj horoj, sub lerta kaj instiga reĝisorado de instruisto de esperantaj instruistoj - Stefan MacGill - aktuala prezidanto de ILEI. Temas pri la unua el planita



serio de porinstruistaj seminarioj kiuj centros en venontjara agado de ILEI. Tiu tritaga intensa seminario, okazita en Esperanto Centro en Poprad, traktis situaci-komunikon instruadon, la manieron, kiun jam de jardeko aplikas ĉiuj modernaj lingvoinstruaj lernolibroj, sed en instruado de esperanto ĝi ankoraŭ apenaŭ konatas!

Partoprenantoj de la seminario havis la avantaĝon detale pristudi unuan tiatipan esperantan lernolibron helpe de ĝia aŭtoro mem. Temas pri la "Tendaraj Tagoj", kies dua kajero aperis ĉi-jare, dum la unua inter-

tempe pli-malpli elĉerpiĝis. Estas nur bedaŭrinde ke tiom granda energio kiun la gvidanto de seminario senavare disdonis dum la instruado, prelegado, aktorado... ne estis distribuita al pli da partoprenintoj, kion oni interalie povas danki al nia jam konate malfruanta informado. Sed, seminarioj almenaŭ devenis el kvar landoj: Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Kroatio, kaj ili jam kun ĝojo atendas daŭrigon de la ludanta lernejo, post la apero de la tria - lasta - kajero, kio devus okazi antaŭ la venonta Kongreso. La sama seminario estos ripetata fare de siaj gvidantoj, do interesantoj ne remaltarafu la okazon ekkoni amuzan libron kaj vigligan instrumanieron.

Viŝnja Brankoviĉ
Esperanto-Centro CS-05801 Poprad

NIAJ SEMAJNAJ KUNVENOJ

Ĉiulunde, je la 19a - krom dum Sarlandaj ferioj - okazas kunveno de SEL en la gastejo 'Hauck Weinstuben' en St. Johanner Markt 7, Sarbrukeno.

☐ 0681-31919



Reaktiviĝo en Viatnamio

Post 18 monata preparo (?) la konata vietnama aktivulo Do Khanh el Ho Chi Minh urbo en pasigis somere 3 monatojn en la urbo Hue (la malnova ĉefurbo, en centra Viatnamio).

Aranĝinte ekspoziciojn li prelegis en pluraj instancoj: urba junulara kaj virina asocioj, en la fremdlingva fakultato, en medicinista lerne-



jo, pedagogia universitato, ktp. La prelegoj pri la lingvo (*Esperanto, ĉu la internacia lingvo de la 2000a jaro?*) kaj pri la aziaj e-

movadoj rikoltis grandajn sukcesojn, do tuj startis pluraj novaj kursoj. Por subteni kaj helpi la laboronestasbonvenaj salutoj, kaj ĉiati-pajesperantaĵoj.

Kontaktadreso:
Nguyen Do Khanh,
Esperanto STK,
359/41, A Le Van
Sy, Q.3, Ho Chi Minh,
Vietnamio.

Alvoko!

La LKK (*Loka Kongresa Komitato*) de la sekvajara Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Vraca, Bulgario serĉas kontaktojn kun la partoprenintoj de la 19-a IJK en la sama urbo, okazinta en 1963.

La tiamaj kongresanoj bonvolu anonci siajn novajn adresojn por ricevi informojn pri la programoj speciale aranĝitaj por ili, en la kadroj de la junulara kongreso en 1993.

Bonvolu skribi al:

Bojĉo Mladenov,
p.k. 66, BG-3000 Vraca, Bulgario.

Movado

MANIFESTACIO ANKAŬ EN HILVERSUMO

La 10-an de oktobro oni faris ion ankaŭ en Nederlando por atentigi la amaskomunikilojn pri la lingvopolitiko en Eŭropo kaj la rolo de Esperanto.

Deko de aktivuloj faris demonstran "promenadon" al la sidejoj de pluraj elsendokompanioj, kiel NOS, TROS, VARA ktp. La grupo surmetis slogankartonojn kaj ankaŭ kunportis banderolon. Sur ili troviĝis la mesaĝo: "Esperanto por egalaj rajtoj en la internacia komunikado" kaj "AŬSKULTI (radio) VIDI (tv) kaj SILENTI pri la demokrata alternativo por internacia komunikado en Eŭropo".

Ĉar estis sabato, la grupo povis paroli nur



al la pordogardistoj kaj transdoni peticion al la programestroj de la respektivaj kompanioj. En la peticioj estis menciataj la problemoj pri lingvo- kaj kulturpolitiko en Eŭropo, kaj estas propono pri informaj programoj vide al la liberigo de la interna merkato en 1993.

Ne venis reago al la antaŭe senditaj gazetaj komunikoj pri la "manifestacio". Reage al la peticioj venis respondoj de

NOS kaj de VARA, ambaŭ negativaj. Tamen ankaŭ negativa respondo estas utila: ĝi montras klare, ke la t.n. publikaj radio- kaj televid-kompanioj kalkulas nur pri la

averaĝa gusto kaj prefero, kaj neglektas la ideojn de malplimulto. La nederlanda leĝo tamen postulas de ili, ke ili respegulu la tutan gamon de kulturo kaj spirita vivo en tiu ĉi lando...

Bert de Wit, Nederlando

Premiitoj de la Stipendio IVO LAPENNA

Memore al Prof. D-ro Ivo Lapenna (1907-1987) kaj liaj elstaraj meritoj por la Internacia Lingvo ĝenerale, kaj ties aplikado en la scienco speciale, la Fondaĵo I. Lapenna starigis "Stipendion Ivo Lapenna".

La stipendio konsistas el subvencio al kiel eble plej multaj **disertacioj je universitata nivelo** (doktoriĝoj, magistrigoj, licenciĝoj, kiuj temas pri



esperantologio aŭ/kaj pri esperanto en rilato kun interlingvistiko, kaj estas ellaborita en spirito de L. Zamenhof kaj I. Lapenna.

La unuan fojon la stipendio (po 100 svizaj frankoj) estis aljuĝita en 1992. por la jenaj faklaboraĵoj:

» 1. "Sprachwandel bei einer Plansprache am Beispiel des Esperanto" (Lingvoŝanĝigo ĉe planlingvo je ekzemplo de esperanto), disertacio akceptita de la Universitato de Konstanco, Germanio.

Aŭtoro: d-ro Benoît Philippe.

» 2. "Le lingue della Comunità Europea con particolare riguardo all'inglese" (La lingvoj en la Eŭropa Komunumo, kun aparta atento pri la angla), disertacio akceptita de la Universitato de Torino, Italio.

Aŭtoro: d-rino Marina Mázzero.

» 3. "Interlinguistik und Esperanto im Zarenreich und in der Sowjetunion" (Interlingvistiko kaj esperanto en la cara regno kaj en Sovetunio), licencita verkaĵo akceptita de la Universitato de Zŭrich, Svisio.

Aŭtoro: S-ro Andy E. Kŭnzli.

La Stipendio I. Lapenna refoje estos aljuĝita en 1993 por disertacioj **oficiale akceptitaj** de universitata instanco **en la jaro 1992**.

Aŭtoroj, dezirantaj kandidatiĝi al la stipendio, bv. peti la detalan regularon - preferere kun respondkuponon - ĉe la sekretario-kasisto de la Fondaĵo:

Torben Svendsen,
Vanlose Allé 57, 1.tv,
DK-2720 Vanlose, Danio.

Limdato por alsendo de la faklaboraĵoj en du ekzempleroj estas **28a de februaro 1993**.

Sendu ilin al:

D-ro Klaus Perko,
Lendkai 111, A-8020 Graz, Aŭstrio.

Televida esperanto-kurso

Ekde la 9-a de oktobro funkcias en la Sabadell-a televida programo katalunlingva esperanto-kurso, kiun gvidas la konata aktivulo s-ano Salvador Aragay.

La kurson iniciatis Josep Ma Galofré, prezidanto de *Kultura Asocio Esperantista*, kaj li sola zorgis pri ĉiuj organizaj detaloj de tiu premiera kurso de esperanto, laŭŝajne senprecedenca en tuta Hispanio.

La lecionoj estas elsendataj vendrede nokte je la 11-a, kaj ili estas ripetataj du pliaj fojoj sekvatage, matene kaj posttagmeze, en ĉiu semajno. La kurso estas subvenciata de la loka magistrato, do ĉiu spektanto povas akiri je tre modera kosto la tiurilatajn lecionojn, inklude de dudirekta vortareto.



Pliaj informoj ĉe:

Kultura Asocio Esperantista,
c/o Ramon M. Torres, C/Montseny 5, 1&, E-08208 Sabadell, Katalunio.
el KAE-Informilo, oktobro/92.

Korajn gratulojn pro tiu imitinda agado al la Sabadell-aj esperantistoj, kiuj neatendante de eksterajn agojn aranĝis la TV-kurson, ja eĉ seneniu ellernus la lingvon per tiu kurso, jam eĉ mem ĝia ekzisto multe altigas la eksteran prestiĝon de esperanto. La red.

Revuo de CED

La revuo "Language Problems & Language Planning" de la Centro por Esploro kaj Dokumentado de Mondaj Lingvo-problemoj estas havebla kontraŭ 35 USD, pagebla senpere al:

John Benjamins Publishing Co,
821 Bethlehem Pike, Philadelphia,
PA-19118, Usono. (Tel: +1-215-836-1200).
el Ondo de Esperanto No. 3



Ekde januaro Aŭstralio E-Asocio kaj Nov-Zelanda E-Asocio havos komunan revuon:

"Esperanto Sub la

Suda Kruco". La ĝisnunaj "Nov-Zelanda Esperantisto" kaj "La Aŭstralio Esperantisto" ne plu aperos.

Redaktoro de la nova, komuna revuo estos Donald Broadribb,
46 Great Eastern Highway, Bakers Hill,
WA-65622, Aŭstralio.

I L E I

Sinteza protokolo de la Komitato de ILEI en Bratislavo

Ĉi tio ne redonas ĉiujn unuopajn diskutojn, sed nur listigas la decidojn. La Komitato:

- Akceptis la aliĝpetojn de sekcioj en Kroatio kaj Rumanio
- Konsentis, ke la siatempa jugoslavia sekcio, kies sekciestro kaj agado baziĝis esence en Slovenio, transformiĝu al Slovena sekcio kaj invitas aliĝpetojn el aliaj regionoj de la siatempa Jugoslavio.
- Konstatis, ke la sekcioj en Japanio kaj Sud-Afriko ĉesis funkcii.
- Konfirmis la akcepton flanke de la Estraro de reprezentantoj por Albanio, Armenio, Aŭstralio, Islando, Kubo, Togolando kaj Ukrainio kun klopodoj akiri reprezentanton por Rusio kaj Jugoslavio.
- Akceptis la kasistan kaj estraran raportojn por 1991.
- Akceptis apartajn regularojn laŭ la skribaj tekstoj senditaj al la sekcioj: unu pri la proceduro proponi Honorajn Membrojn, alia por regi la aljuĝon de premio por la plej aktiva landa sekcio.
- Akceptis precizigojn al la Regularo de ILEI jene:
 - unu komitatano rajtas porti maksimume du voĉojn, kondiĉe, ke tio estas skribe rajtigita de la koncerna sekcio.
 - kvorumo por valide kunsidi estas unu duono de ĉiuj rajtigataj komitatanoj. (Por ŝanĝi la Statuton estas triono, por malfondi la Ligon duono.)
 - kvorumo por skriba voĉdono estas unu duono de ĉiuj rajtigataj komitatanoj; la Estraro rajtas voĉdonigi la komitatanojn tra la sekcioj.
- Akceptis la demisiojn de du estraranoj: s-ro ANDREASSON kaj s-ino BARCSAY. La unua rekandidatiĝis kaj reelektiĝis, la dua ne rekandidatiĝis sed fariĝis estrara komisiito pri la Gimnazio kaj Instruado. Al la vaka loko estas elektita d-ro Till DAHLENBURG (Germanio), bone konata kiel estrarano en la antaŭa estraro. Li respondecas pri instruado kaj ekzamenoj. S-ino BELOSEVIC sekve ne plu respondecas pri ekzamenoj, sed akceptas respondeci pri konferencoj kaj aranĝoj el organiza vidpunkto.
- Akceptis buĝeton por 1993 kun enspezoj 72.500 SEK kaj elspezoj de 84.800.
- Rekomendis forte, ke la Gimnazio de ILEI fariĝu reala aranĝo kadre de la Konferencoj.

Stefan MacGill
prezidanto de ILEI
laŭ Int. Pedagogia Revuo, 3/92.

Pliaj informoj pri ILEI ĉe la prezidanto:

Stefan MacGill,
Eső u. 7. III, H-1034 Budapest, Hungario.

PRI LA INSIGNO

La artikolo de J.K. Hammer pri *Esperanto kaj ĝia simbolo* en Heroldo 16/91 multe interesis min. Pri la origino de la insigno la jenaj kompletigoj eble interesos la legantojn.

Ja al Louis de Beaufront (Louis Chevreux ĝustanome) apartenas la propono pri verda stelo kiel esperantista simbolo aprobita de D-ro Zamenhof (*Esperantisto de 1893*, p.47.). Cetere, Beaufront alprenis kvinpintan stelon sur verda kovrilo jam en 1892 por sia franclingva traduko de la rusa lernolibro de D-ro Esperanto.

La unua, kiu ĝin fabrikis sub formo de surpersone portebla insigno, estis estono, Hermann Stahlberg, oraĵisto-juvelisto.

René Lemaire, plej proksima kunlaboranto de Beaufront kaj sekretario de la Societo por la Propagando de Esperanto, en franclingva artikolo, titolita "Nia insigno", ĝin priskribas en *L'Espérantiste*



de februaro 1900. La insigno de H. Stahlberg estis 20 mm ronda, blanke emajlita kun verda kvinpinta stelo en la centro; sur

ĝi estis skribita la vorto ESPERANTO, orumite, same kiel orumitaj estis la sin krucigantaj palmoj kaj la ĉirkaŭaĵo de la medallo. La insignoj estis el arĝento aŭ el bronzo.

La jaro 1900 estis la jaro de Universala Ekspozicio en Parizo. En la supre menciita artikolo R. Lemaire kaptis la okazon por emfazi pri neceso de insigna rekonigilo. Ja diversnaciaj esperantistoj estis atendataj - kaj venis - en Parizo tiom pli, ke la rusa pavilono lasis sufiĉe da spaco por ekspozicio al la rusa esperantista societo "Espero" (*Enciklopedio de Esperanto*, p.145.). Tie, la unuan fojon, samtempe sin renkontis diversnaciaj esperantistoj.

Sekva okazo, por ke esperantistoj sin retrovu en diversnacia etoso, estis la praa internacia kongreso en Kalezo-Dovro (1904) kiel pluigo de pli modesta renkontiĝo la antaŭan jaron en Havro. Dumkongrese, diskuto estis pri elekto de esperantista insigno kaj alprenita estis la jena decido: "La signo de rekonio por la esperantistoj, kiun oni rekomendas por la kunvenoj, vojaĝoj k.s. estas la verda kvinpinta stelo". Kroma decido estis, laŭ propono de Alfred Micheaux, inviti la tutmondajn esperantistojn kaj D-ron Zamenhof al Bulonjo-ĉe-Marco en 1905.

Koncerne la insignon, mi volas fine diri, ke juna havrano, Emile Gasse, esperantisto de 1900, ne preteratentis la kunvenan decidon, partoprenis en la bulonja kongreso kaj registris sian propran modelon de esperantista insigno plej konata, antaŭmilite, sub la nomo "signo Gasse".



Emilo GASSE

Jean Amoureux
Heroldo de Esperanto, 26/aprilo/1992.

Koreoj havas propran oficejon!

La koreia esperantistaro delonge deziris havi sian sidejon, tamen pro manko de monrimedoj tio estis longe nerealigebla sonĝo. La nove elektita prezidanto de Korea Esperanto-Asocio, s-ro Han Moo-hyup iniciatis monkoloktan kampanjon por aĉeti oficejon. La monkoloktado komenciĝis la unuan de oktobro 1991. Ĝi vekis grandan reehon. La oficejo kostis 88.500.000 ŭonojn, sed 550 esperantistoj kolektis 95.970.834 ŭonojn (223.187 guldenoj)!!!

laŭ Bulgara Esperantisto 9/92.

Jacques-Louis Mahè

La 4-an de aŭgusto 1992 en Parizo forpasis en la aĝo de 80 jaroj Jacques-Louis Mahè, la aŭtoro de la unua longdaŭra parolata filmo en esperanto *Angoroj*. Inter esperantistoj li estis konata ankaŭ sub la plumnomo *Lorjak*, kiel verkinto de originalaj romanoj kaj novelaroj: *Neologisme*, *Transe*, *Retoj*, *Regulus*, *Iluzioj*, *Eŭlalia*, *Mariagnes*, *Kromosomoj*.



La unuan fojon ekster Svedio

KULTURA ESPERANTO-FESTIVALO!

KEF-4 la festivalo pri originala esperanto-kulturo (muziko, teatro, literaturo, ktp.) okazos inter 19-22. de aŭgusto 1993 en Kopenhago, Danio en la teatro "Pulvobarelo" (Serridlevsvej 2, Kobenhavn).

Aliĝilo aperos baldaŭ. Detalajn informojn kaj la aiĝilon petu ĉe:

Jakob Nordfalk, Norre Allé 75, vaer 571,
DK-2100 Kobenhavn-0, Danio

Esperanto en radio

Nova horaro ĉe Radio Havano

Jen la horaro, valida inter la 8-a de novembro ĝis la 28-a de februaro. La tempoj estas indikitaj en UT (en meza Eŭropo aldonu 1 horon).

- 07.00 - 6060 kHz (49 m) por Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio;
- 15.00 - 11.760 kHz (25 m) por Amerika kontinento kaj Karibio;
- 18.30 - 17.705 kHz (16 m) por Eŭropo;
- 22.00 - 17.705 kHz (16 m) por Eŭropo;
- 23.30 - 11.760/11.970/9655 kHz (25 resp. 31 m) por Ameriko kaj Karibio.

Pliajn informojn petu de la E-redakcio, pk. 6240, Havano, Kubo.

Korespondi deziras

27-jara komencantino kun intereso al rok-muziko, biciklado, libroj, ekskurso ktp. volas korespondi kun gejunuloj el diversaj landoj. *Nóra Seres, Kisköz u. 5, H-5905 Orosháza, Hungario.*

Stefania Paruzzo, 14-jara knabino serĉas korespondajn konatojn. *Via Villaranza 31/A, I-35010 Villafranca (Padova), Italio.*

Mi estas 27 aĝa, kaj nova esperantisto. Mi volas korespondi por praktiki la lingvon. Min interesas literaturo, kaj kolektas diversajn gazetojn. Skribu al mi! *f-ino Malgorzata Stefanik, ul. Przybówka 134, PL-38-471 Wojaszówka, woj. Kvosno N/W, Polio.*

31, 40, 43 jaraĝaj hungaraj sinjorinoj serĉas korespondajn partnerojn tutmonde, kun intereso al vojaĝo kaj multaj aliaj temoj.

S-ino Jánosné Víz, Madách u. 12, H-8900 Zalaegerszeg, Hungario.

S-ro Frant Stejskal, fraŭlo, 60 j. ministro, *Jatani 674, CS-41705 Osek-u-Duchcova, Ĉeĥoslovakio* deziras korespondi tutmonde.

Mi estas 53 jara, registrita komercisto, kaj lernas esperanton de du jaroj. Mi volonte konatiĝus kun iu hungara e-isto por ekkoni tiun faman landon.

Leo Mezencev, ul. Sportivnaja 4-9, RUS-620116 Sverdlovsk P-116 (Ĵekaterinburg), Rusio.

Grupo de lernantoj, kiuj lernas esperanton kiel laŭhorara studobjekto en mezlernejo, deziras korespondi individue aŭ grupe kun 15-18 aĝaj gejunuloj. Ankaŭ ilia instruisto serĉas kontaktojn kun geinstruistoj, kiuj instruas e-on en mezlernejo. Skribu al:

Mezlernejo Ady Endre, Vasút u. 2, H-5720 Sarkad, Hungario.

Survoje



SURVOJE

dumonata revuo de Unuiĝo por Novtipa Internacia Kulturo, UNIKO. "Survoje" aperas jam la trian jaron. Eldonata en Sevastopol, Ukrainio, ĝi estas avangard- (alternativ-?) - kultur- gazeto / literatura revuo.

En la 12-a numero: "Pri maro da revuoj kaj amaro de revoj", "Principoj de feniksismo", "Veprokulturo", "Malvenko", "El katalogo de neokazinta ekspozicio" ktp.

Ĉiam pensiga, plejparte interesa, senescepte agaca, por personoj kiuj volas legi aktualajn avangardajn literaturon kaj pensaron. Tre bone redaktata.

Abono por 6 numeroj ĉe "La Gazeto", 130 FRF, F-55210 Creue, Francio.

Adreso de la redakcio:

Survoje, pk. 168, UKR-335057 Sevastopol-57, Ukrainio.

recenzo el "Aŭstralia Esperantisto" nov/92.

Konkurso

Loka Kongresa Komitato de la sekvajara Internacia Junulara Kongreso en Vraca kun la Literatura sekcio de Bulgara Esperanto-Asocio organizas

INTERNACIAN LITERATURAN KONKURSON pri junulara temo.

La verkoj el ĉiuj ĝenroj, ĝis nun ne publikitaj, devas atingi la kongresan adreson ĝis la 30-a de junio 1993.

Sur la koverton menciu: "Por la literatura konkurso". La premioj estos diplomoj kaj libroj, la rezulto estos anoncita dum la kongreso (7-14.08.93).

La konkursaĵojn sendu al:

*LKK de IJK,
p.k. 26, BG-3000 Vraca, Bulgario.*

Antaŭkongreso kaj video-konkurso

La antaŭkongreso de UK okazos inter la 20-a kaj 23-a de julio en Barcelono.

La programon konsistigos pluraj ekskursoj, ekz. al la prestiĝa Hispana Esperanto-Muzeo en Sant Paul d'Ordal, al la muzeo Picasso k.a., krome prelegoj de Giordano Moya pri "La homa vivaventuro" kaj "Esperanto en prospektivo" - kaj publika videokonkurso.

La video-konkurso povas partopreni iu ajn esperantisto kun VHS-sistema e-lingva filmo. Daŭro: minimume 5, maksimume 15 minutoj. Branĉoj: eduko, scienco, kulturo.

Pliaj detaloj estas haveblaj ĉe:

*Barcelona Esperanto-Centro,
str. Carreras Candi 34-36,
E-08028 Barcelono, Hispanio.*

el KAE informilo No. 25.

Internaci konkurso por lernejoj

4-A TASKFOLIO POR BAZLERNEJANOJ

1. Finu la verbojn per la sama sufikso signifanta lokon! (3 poentoj)
lern..., manĝ..., dorm..., ban..., lud..., loĝ...
2. Konstruu frazon uzante ĉiujn donitajn vortojn! (3 poentoj)
la, la, lernado, plej, diligenta, de, estas, grava, gelernantoj, tasko,
3. Kompletigu la frazon per konvenaj prepozicioj! (3 poentoj)
... la amikino mi veturis ... kuracisto ... aŭtobuso.
4. Difinu la vortojn en esperanto: *kampano, kormorano, veterano* (3 poentoj)
5. Konstruu almenaŭ kvar kunmetitajn vortojn per "manĝ-!" (2 poentoj)
6. Kio estis *Zamenhof* laŭ sia profesio? (2 poentoj)
7. En kiu lando kaj urbo okazos la UK en 1993? (2 poentoj)
8. Kompletigu kaj desegnu! (2 poentoj)
.e..a ..e.o

ONI POVAS IAM AJN ALIĜI AL LA KONKURSO! Regularon vidu en la numero aŭgusto (1)-92. La solvojn sendu **ĝis 25.01.93.** al:

*Általános Iskola, Esperanto-grupo,
Állomás u. 1, H-3711 Szirmabesenyő, Hungario.*



Anoncetoj

La 28-an de majo 1992, en kunveno de la "Amikoj de la Akademio", okazinta en Parizo, la juna esperantisto, s-ano Jorge Camacho Gordon (*Kamaĉo*), rezidanta en Madrido, estis elektita membro de la "Akademio de Esperanto". Ankaŭ *Kultura Asocio de Esperanto* el Katalunio kore gratulas lin.

◆ ◆ ◆

La Esperanto-klubo en Nijmegen deziras kontaktojn kun alia e-klubo en Eŭropo (por korespondi, ktp). La leteroj estas atendataj ĉe:

*H.v.d. Schaaf, Malvert 32-08,
NL-6538 BX Nijmegen, Nederlando.*

◆ ◆ ◆

En mia lernejo estas instruata la germana kaj la angla, sed la direktoro rifuzas enkonduki esperanton, asertante ke "neniu en la mondo parolas ĝin". Dediĉu por ni bonvolu tempon da unu poŝtkarto kun e-lingva teksto, por pruvi la vivon de nia lingvo!

*R. Henryk, Gimnazium, Havlickova 13,
CS-73701 Cesky Tesin, Ĉeĥoslovakio.*

◆ ◆ ◆

Internacia Vendo-Reto *SORTIMENTO (IVERS)* invitas vin kunlabori, por multe profiti finance kaj morale! Detala priskribo de la projekto, kaj aliĝilo riceveblas kontraŭ 2 IRK-j.

*Agentejo SORTIMENTO, Pk. 138,
H-6100 Kiskunfélegyháza, Hungario.*



NI DEZIRAS
AGRABLAN
KRISTNASK-FESTON
AL ĈIUJ NIAJ LEGANTOJ.

Kunlaborantoj de EVENTOJ

EVENTOJ, esperantó nyelvű információs lap.
Nyf. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.
Készült az M & M nyomdában:
H-1181 Budapest, Tordai u. 15.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio
kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondacas pri la anonc-enhavo.

Kiel aboni al EVENTOJ?

1. Plenu la abonilon, aŭ skribu leteron kun la sama enhavo, kaj sendu ĝin al la redakcio (*LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87, Hungario*).

2. Pagu la abonkotizon al vialanda peranto listigitaj sube en la koncerna nacia valuto kaj sumo. La baza abonkotizo por 1993 estas 59 guldenoj, (aere: 68 guldenoj), por orient-eŭropaj landoj: 23 guldenoj.

3. La revuon vi ricevos rekte el Hungario perpoŝte.

Kiel pagi?

- Sendu la kotizon al vialanda kotizperanto (perpoŝte aŭ poŝtĝirkonto) - en nacia valuto.

- Sendu la monon al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, kodo ELLS-S, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. (59 gld, aere: 68 gld.)

- Sendu la monon rekte al la redakcio per simpla internacia poŝtmandato, aŭ perbanke al Banko OTP, Budapest XVIII, Konto 218-98189/542-030808-7. Vi povas sendi ankaŭ euroĉekon. La valuto sur ĝi devas esti en ajna tipo de konvertebla valuto. Sur la dorsa flanko nepre skribu la numeron de via bankkarto!

- En fina kazo - je via risiko - sendu monbiletojn (en konvertebla valuto inkluzive forintojn) en fermita koverto al la redakcio.

Landaj kotizperantoj

Aŭstralio: Libroservo de EAE, Tom Elliott, Pk. 230, Matraville, 2036 N.S.W.

Aŭstrio: Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg (pĉk. 7.127.144). -345 ATS.

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). - 1080 BEF, aere: 1250 BEF.

Brazilio: Brazila Esperanto-Ligo, Cx. Postal 03625, Brasilia (DF) 70084.

Britio: Paul Hewitt, 26 Highfield Rd, North Thoresby, Grimsby, S. Humbs, DN36 5RT. - 22 GBP, aere: 25 GBP.

Bulgario: Ljubomir Trifonĉovskij, Al. Stambolijski 17, ap. 11, BG-3000 Vraca. - 330 levoj.

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vladimír Dvoraĉ, Jiřka 10, CS-110 00 Praha-1. - 360 KCS.

Danio: Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, DK-8260 Viby-J. (Poŝtĝinnumero: 696 4737)

Finnlando: Oy Mendoservo, Lasse Kivis-

tö, Kivistöntie Hyvinkää, SF-05510.

- 166 FIM, aere: 192 FIM.

Francio: UFE, 4. bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk. 855-35 D Paris).

- 185 FRF, aere: 215 FRF.

Germanio: Monda Merkato, Alfred Schubert, Pf. 1539, DW-8120 Weilheim, (konto 365255-806, postgiroamt München, BLZ 700 100 80). - 54 DEM.

Hungario: LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87. - 980 Ft.

Hispanio: Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila 127, p.7, 2ª izda, E-39007 Santander (Cantabria) Bankkonto ĉe Caja Postal n-ro 03548531 (O.P.)

Islando: Libroservo de IEA, Saemundsson Hallgrímur, Godatuni 10, IS-210 Gardabae.

Israelo: Aviv Faklieru, Pk. 8383, IL-61083 Tel-Aviv, (konto 403679, Bank Mizrahi, Faklieru Esperanto).

Italio: Itala Esperanto-Federacio, via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk. 37312204).

- 46 m ITL, aere: 53 m ITL.

Japanio: Rondo Harmonia, Yamaguti Sin'iti, Tutihara 3-205, Tenpaku-ku, J-468 Nagoya-si. - 4600 JPY, aere: 5300 JPY.

Koreio: Seula E-Kulturcentro, Jung-Ke Lee, C.P.O. Box 3047, Seoul, 100-630.

Kroatio: Kroatia E-Unuiĝo, M. Belošević, Trg Burze 2, HRV-41000 Zagreb.

Norvegio: Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, poŝtĝirokonto 0809 5100318.

Polio: P.W.H. NEPO, skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Broniewskiego 77. m. 137, PL-01865 Warszawa.

- 236.000 PLZ.

Portugalo: Libroservo de Portugala Esperanto-Asocio, Rua rd. Joao Couto 6, R/C-A, P-1500 Lisboa.

Sud-Afriko: Colin Beckford, PO Box 1227, SA-8000 Cape Town.

Svedio: Sveda Esperanto Federacio, SEF, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby.

Svislando: Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen.

- 47 CHF, aere: 54 CHF.

Usono: E-Ligo por Norda Ameriko, Mike Donohoo, POB 1129, El Cerrito, CA-94530. - 35 USD, aere: 40 USD.

Venezuelo: Prof. J. E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

sendu al: EVENTOJ, H-1675 Budapest pk. 87, Hungario

ABONILO

Jes, mi abonas al la gazeto *EVENTOJ* por 1993.

Familia nomo, nomo:


Preciza adreso:

..... poŝta kodo:

La abonprezon de (sumo) mi pagis al:

Dato: Subskribo:

Historio



u mi tedu la leganton per la detala priskribo de mia vojaĝo Parizon? Ne, tion mi ne volas fari. Sufiĉu diri nur, ke dumvoje mi vizitis la maljunan samideanon S-ro E. Meier, en München; tio estis la unua okazo, kiam mi parolis kun esperantisto nekonanta la hungaran lingvon.

Tamen, pri unu epizodo mi raportas. Kiam ni forlasis la lastan germanan urbon, Deutsch-Avrincourt, kaj nia vagonaro eniĝis en Francujon, en la unuan francan urbon, Igney-Avrincourt, tie mi malagrable spertis la konsekvencojn de mia nekono de la franca lingvo. Estis posttagmeze, kiam ni alvenis en la ĵus nomitan francan limurbon, kaj tie ni devis atendi pli ol unu horon ĝis la reforiro. Tiun tempon mi intencis profiti por tagmanĝo; mi mendis do nutraĵojn en la stacidoma restoracio - en lingvo germana (tiam mi ankoraŭ ne parolis france). Sed, ho ve! neniun komprenis min! oni ne alportis manĝaĵojn... Kun patra doloro mi rigardis miajn malgrandajn infanojn, kiuj jam komencis plendi pri malsato. Mi denove mendis ion por manĝi - denove germane - parolante pri la infanoj, kiuj jam de longa tempo ne vidis konvenajn nutraĵojn, - vane! oni ne komprenis, ne komprenis. Tiam, kun edza doloro, maldolĉe mi turnis min al mia edzino, nerve plendante, en lingvo hungara:

— Belaĉa afero, ĝis Parizo ni ne manĝos, je diablo!

Kaj jen, nun sinjorino, el la servopersonaro de la restoracio, ĝentile demandis min germane:

- Kiun lingvon vi parolas, gesinjoroj?
- La hungaran; ni estas hungaroj, kaj ni vojaĝas Parizon.
- Do vi ne estas germanoj?
- Ne, sinjorino, kaj...
- Ho, tiuj ĉarmaj infanoj, kredeble ili estas lacaj kaj malsataj; oni tuj servos al vi, gesinjoroj.

Kaj, ho miraklo! tiam kelnero, servisto, kasisto, ĉiuj, ĉiuj komprenis germane... ĉar ili jam sciis, ke ni ja ne estas germanoj...

En Parizo, S-ro Fruictier atendis nin en la stacidomo kaj li servoprete kondukis nin en nian provizoran, kaj la morgaŭan tagon en nian definitivan loĝejon.

Tuj la unuan tagon de mia estado en Parizo S-ro Fruictier prezentis min al S-ro Th. Cart. Ne estas necese, - ĉu ne vere, kara leganto? - ke mi pli detale raportu al vi, kiu estas S-ro Cart; vi ja konas lin, ĉiu konas lin. Lia nomo estos markita per oraj literoj sur ĉiu paĝo de la historio de Esperanto, kaj mi tute ne troas dirante, ke sen li eĉ ne estas certe, ĉu Esperanto vivus hodiaŭ. Por plilarĝigi vian konon pri li, mi aldonos nur, ke mi ne nur respektas, ne nur admiras tiun modelecian viron, sed mi vere amas lin, kaj mi estas fiera, sciante, ke tiu amo estas adresita al plenmerita homo.

Post kelktaga ripozo ni (S-ro Fruictier kaj mi) komenkis labori. Ni priparolis detale la fondotan presejon, faris planon, luis ejon (33, rue Lacépède) kaj mendis ĉion necesan. Mi parolis ĉiam esperante (devige!), ĉie, en literfandejo, en maŝinfabrike, en inkajfarejo, en papermagazeno, ĉe konstruistoj, ĉe masonistoj, ĉe lignajistoj, ĉe vitristoj, ĉe ĉifonistoj, ktp. ktp., propagandante tiamaniere nian lingvon ĉie. Post kelkaj semajnoj la

El miaj rememoroj

daŭrigo

presejo estis funkciopreta, kaj la oktobra numero 1904 estis jam presita en ĝi. (La antaŭan numeron, por ne tro malfruigi ĝin, pro la manko de presejo, oni presis en Céret, sub la gvidado de nia fervora, bedaŭrinde jam mortinta samideano Paul Berthelot.)

Krom la necesaj litertipoj kaj kompostmaterialoj, kune kun la specialaj supersignitaj literoj esperantaj, la presejo konsistis el unu granda presmaŝino, unu malgranda platpresila maŝino, unu "Linotype" kompostmaŝino, unu motoro kun la bezonaj transmisioj, kaj en la papermagazeno unu granda papertranĉmaŝino. Ses ĉambrojn okupis la Societo, el kiuj unu - la kompostejo - sur la strata fronto; en tiu ĉi ni akceptis la klientojn kaj la samideanojn, el kiuj kelkaj entuziasmoj konsideris nian esperantan entreprenon kvazaŭ ĝi estus la "oka mirindaĵo de la mondo".

Post la oficiala deklaro pri la fondo de la "Presa Esperantista Societo", farita per fondodokumento antaŭ notario, la Societo faris sian unuan ĝeneralan kunvenon, en kiu oni elektis la estraron: prezidanto: S-ro Th. Cart; delegito: S-ro Paul Fruictier; sekretario: S-ro William Mann; teknika direktoro: mi. Poste, oni elektis ankoraŭ unu delegiton: S-ron Ch. Verax, kaj, post la finiĝo de la deĵorado de S-ro Mann, F-ino Cécile Royer fariĝis sekretariino.

En Parizo mi pasigis dek jarojn. Dum tiuj dek jaroj mi vivis en vera atmosfero esperantista. Mi estis ĉiam inter esperantistoj, kaj mi parolis ĉiam esperante. Esperanto bone servis min, kaj mi klopodis servi Esperanton. Ĉu mi sukcesis? tion juĝi ne estas mia afero.


"Rememorojn" skribi el tiu dekjara epoko estus certe malfacile, eĉ sence. Kiajn rememorojn povus skribi, ekzemple, oficisto, kiu ĉiutage, en sia oficejo, faras sian servon? Tio ja estus tasko neplenumbla. Miaj personaj aferoj ja neniun interesus, - ĉu ne vere?... Mi do ĉesigas la daŭrigon de miaj Rememoroj; tamen, por fari plenan laboron, mi raportos en la sekvantaj linioj pri kelkaj okazintaĵoj min koncernantaj rilate al Esperanto.

La ĝenerala kunvenado de la parizaj samideanoj okazis tiutempe en la Sorbonne. Tiujn kunvenojn la Pariza Grupo Esperantista aranĝis ĉiuvendrede. Tie mi konatiĝis kun multaj famaj esperantistoj, inter kiuj mi sentis min kvazaŭ hejme. La sama Grupo aranĝis ankaŭ, la 12-an de ĉiu monato, komunan vespermanĝon, kie oni vere amike, eĉ familie amuziĝis: oni ne nur "vespermanĝis", sed distriĝis per seriozaj kaj amuzaj interparoloj, ideoŝanĝoj kaj ludoj. Precipe per ludoj! Oni tiel kore ridis pro la humoraj turnoj de tiuj ĉarmaj ludoj!... Ho, belaj tempoj! kien vi malaperis!...

En la unuaj monatoj de mia estado en Parizo mi konatiĝis kun mia samlandano S-ro V. Polgár, tipografo, kiu tuj fariĝis esperantisto, kaj laboristo en la Presa Esperantista Societo. - Post kelkaj jaroj li aĉetis la presejon, li ankaŭ hodiaŭ estas ĝia posedanto; la societo restigis al si la eldonejon kaj la librejon.

Unu jaron poste, mi konatiĝis kun lia frato, S-ro J. Polgár, ankaŭ kiu fariĝis esperantisto. Li estas la aŭtoro de la bona esperanta kurslibro por Hungaroj, kiu estas ĉiam tre ŝatata en Budapeŝto.

La unua Universala Kongreso de Esperanto (Boulogne-sur-Mer, 1905) starigis la Lingvan Komitaton. Mi havis la grandan honoron esti elektita por ĝi membro; kaj kiam la esperantista Akademio estis starigita, je la okazo de ĝia elutigo oni elektis ankaŭ min akademiano.



-ro Fruictier kaj Verax, post kelkaj jaroj (mi pensas, en 1907) forlasis la presejon; ilian oficon okupis S-ro Warnier, la patro de nia konata samideano. Li estis bona fakano, sed bedaŭrinde li ne estis esperantisto! Lia estreco ne daŭris longe, ĉar tiam okazis, ke S-ro V. Polgár aĉetis la presejon.

Je tiu okazo "Lingvo Internacia" eniris en la manojn de S-ro Th. Cart. Li prenis sur sin la redaktadon, kaj, per sia aferamo, talento kaj energio li levis ĝin sur tre altan nivelon. Neesprimebla domaĝo estas, ke la mondmilito devigis ĉesigi ĝian eliradon.

Kaj nun, kara leganto, pardonu al mi, se mi iom nemodeste parolos pri mia literatura agado! mi sentas, ke mi devas paroli pri ĝi.

Kiel kunlaboranto de "Lingvo Internacia", mi verkis multajn artikolojn, literaturajn kaj lingvajn. En 1909, mi prenis sur min la redaktadon de "Juna Esperantisto"; ankaŭ tiu ĉi ĉesis kaŭze de la milito. Cetere mi skribis artikolojn ankaŭ por aliaj gazetoj esperantistaj kaj verkis aŭ tradukis ankaŭ memstarajn librojn, el kiuj mi notas tie ĉi: "Mallumaĵoj" (trad.), "Libro de l'Humoraĵo" (nova eldono), "La Kalendaro" (orig.), "Fundamento de Esperanto" (traduko por Hungaroj); mi aldonas al ili ankaŭ la hungarigon de la tiel nomata "Ĉefeca Ŝlosilo".

Per unu el miaj verkoj, "Regno de l'Homoj", mi sukcesis gajni la unuan premion de la Zamenhofa literatura konkurso dum la Barcelona Kongreso en la jaro 1909. En aliaj literaturaj konkursoj mi partoprenis kiel prezidanto aŭ membro de la juĝantaro.

Sur la kampo de la propagando mi ne atingis multan sukceson. Al propagando mi ne taŭgis kaj ne taŭgas; vere, mi povus kalkuli per miaj manfingroj la personojn, kiujn mi esperantistigis - krom miaj infanoj. Ĉar, komprenoble, ankaŭ la infanoj de esperantisto devas esti esperantistoj; ĉu ne vere? Kaj pardonu al mi tiun malgrandan patran vantecon, kara leganto, kaj permesu al mi diri, ke unu el miaj filoj, Paŭlo, en sia 15-jara aĝo, gajnis 100 frankan premion en la pariza Michelin'a Konkurso por la junuloj. (Hodiaŭ li estas la teknika aranĝanto de la "Literatura Mondo".)

Kun ŝveliginta koro mi atendis, en la jaro 1914, la Parizan Kongreson. Malrapidege pasis la tempo, kaj kun granda malpacienco mi kalkulis la monatojn, la semajnojn, fine la tagojn ĝis aŭgusto, kiam la fama mondkongreso, la krono de ĉiuj kongresoj, estis malfermata.

Per miaj spiritaj okuloj mi jam vidis la dolĉe ridetantan Anĝelon de l' paco, blanke vestitan, radiantan, kun brilanta stelo, kun sankta oleobranĉeto. Kaj la atendita tago fine alvenis... ĝi alvenis... kaj mia vizio disfalis ... la Anĝelo ploris... lia blanka vestaĵo sangmakuliĝis, lia stelo estingiĝis kaj monstroj neniigis la oleobranĉeton ... ho, teruro... teruro!

Venis la mondmilito, honto de l' homaro.

Kvin jarojn mi pasigis en malliberejo, kune kun mia familio!

Kiam la milito eksplodis, la franca registraro alvokis ĉiujn Germanojn, Aŭstrojn kaj Hungarojn loĝantajn en Francujo, ke ili tuj prezentu sin al speciala magistrato por esti internigita por la daŭro de milito. Tiamaniere ankaŭ mi devis min submeti al tiu ĉi malĝoja sorto, kaj

oni forportis min, kune kun mia familio, en la urbeton Argenton-sur-Creuse, kaj de tie, post kelkaj monatoj, en Châteauroux, fine, en 1916, en Guérande. Mi ne volas tedi la leganton per la priskribo de la mizeroj suferitaj de ni en la malliberejo; sufiĉu diri nur, ke krom tiu malliberigo, oni konfiskis tutan nian havaĵon, kaj ne nur la monvalorantajn objektojn, kiel mebloj, litilaro, vestaĵoj, biblioteko k.t.p., sed ankaŭ la senvaloraĵojn tre karajn al mi: la familiajn relikvojn, portretojn, skribaĵojn, dokumentojn... ĉion, ĉion! lasante al ni nur la vestojn kiujn ni portis sur nia korpo. Do, mi ne havas plu gazetojn, librojn, nenium esperantaĵojn; mi ne havas ekzemplerojn eĉ el miaj propraj verkoj!...

En Châteauroux, komence, estis permesite eliri el la malliberejo, por kelkaj horoj, je certaj kondiĉoj. Tie mi konatiĝis kun S-ro L. Moreau, delegito de l' Universala Esperanto Asocio en tiu urbo, kaj kun lia familio. Li estis tre afabla, amika al mi, ofte li invitis nin tagmanĝi ĉe li, kaj li sincere penis pli mildigi nian malfeliĉon. Tiam mi denove spertis, ke Esperanto ne estas nur lingvo; ĝi estas io alia ...

Mia karega amiko, S-ro Th. Cart, sentigis al mi ofte la noblecon de sia koro. Li, kvankam neriĉa, helpis nin ne nur mone, sed ankaŭ alimaniere. Eĉ vestaĵojn li sendis por ni, kio estis neesprimeble valora donaco en tiu mizero.

Ankaŭ S-ro Frechas, la redaktoro de "Le Monde Espérantiste", kaj la jam mortinta S-ro Hodler, tiam redaktoro de la svislanda "Esperanto", helpis nin mone. Por tiuj du gazetoj mi eĉ sukcesis sendi artikolojn el la malliberejo - komprenoble ne pri la malliberejo!!!...

Estas preskaŭ nekredible, ke, inter la malliberuloj de nia ejo, inter mil personoj proksimume, ne troviĝis eĉ unu esperantisto! Nur inter la soldatoj gardantaj la ejon mi trovis du samideanojn ... ili konsideris nin de "malamikoj" tuj amikoj kaj ili faris en nia intereso kion ili povis ... Ja! Esperanto ne estas nur lingvo; ĝi estas io alia...

Mi jam diris, ke sur la kampo de la propagando mi neniam atingis grandan sukceson. Tamen, mi provis fari kurson en la malliberejo, mi havis dekon da lernantoj, sed bedaŭrinde nur unu persono el ili fariĝis serioza esperantisto: S-ro Fr. Pusztai, kiu estas hodiaŭ politeknikano en Budapeŝto. Tiu energia junulo estas vera esperantisto, kaj li rajtigas esperi, ke en la estonteco li ludos gravan rolon en nia nobla afero.

En junio 1919, nia mallibereco finiĝis: oni transportis nin en Budapeŝton. En malsana stato mi alvenis en la ĉefurbon de mia malgrandigita patrujo, sed malgraŭ tio mi ne forgesis pri Esperanto, kvankam - mi konfesas - la teruraj travivitaĵoj multe malakrigis mian ĉiuspecan energion kaj volon. Tie ĉi mi baldaŭ konatiĝis kun la plej famaj hungaraj samideanoj; sed bedaŭrinde, mi ne povas tiel partopreni en la komuna vivo esperantista kiel mi volus, ĉar, kaŭze de la nunaj loĝmizeroj, ni devas loĝi ekster la urbo, kaj la komunikigo estas tre malfacila.

Tamen, por montri vivosignon, mi verkis detalan esperantan lernolibron por Hungaroj, kiun eldonis la firmo "Kultura". Kaj nun, kiel vi scias, kara leganto, laŭ mia modesta povo mi partoprenas en la redaktado de la "Literatura Mondo"; mia unua laboro por ĝi estas tiu ĉi artikolo pri miaj rememoroj, kiu jen estas finita.

Paŭlo de Lengyel
Paŭlo de Lengyel